


# LA JUNA VIVO

DUŜEMAJNA  
ORGANO

POR LA  
JUNULARO



Redakcio kaj Administrado:  
West-Graafdiijk (N.H.)  
Nederlando.

Gironumero 209354 Nederlando.

Nederlando: jarabono f 0,75

Unuobla ekz. f 0.03

duobla ekz. f 0.06

Aliaj landoj: jarabono f 1.00.  
(15 Belg. fr. 10 Fr. fr.)

Por progresintoj.

## KIEL ART PLUGER SENPAGE PERDIS SIAJN HAROJN.

La patrino de Okke Tanma deziras, ke li iru al la barbiro, ĉar liaj haroj estas multe tro longaj. Sed li ne volas. Nun ŝi elpensas ruzon. Ŝi faras interkonsenton kun la barbiro, ke ŝi sendos Okke al li por briko da sapo. La barbiro tiam bone traktos lin. Survoje al la frizisto Okke ekludas per ludglobetoj. Lia kamarado Art Pluger faros la aĉeton kaj ricevos rekompence kelkajn globetojn.

Art baldaŭ atingis la frizejon, malfermis la pordon kaj eniris.

„Bonan tagon”, li diris al la barbiro kaj la servisto, kiuj estis en la ejo. Ili resalutis kaj Halder, la barbiro, demandis: „Nu, ĉu vi venas por razigi vin?”

„Ne, mi venas por briko da sapo kvincenda. Estas por sinjorino Tanma el la Mallumstrateto.

„Ha tiel!” estis la respondo, kaj ruza rideto kurbigis la lipojn de la barbiro. Li rigardis al la longaj haroj de Art kaj li komprenis, ke la patrino ilin trovas tro longaj. Li interŝanĝis rigardon kun sia servisto, kiu iris malantaŭ Art al la pordo, fermis ĝin kaj turnis la ŝlosilon.

„Jen, tiu birdo estas en la kaptilo!” li ridis. Art rigardis lin per grandaj okuloj. Li tute ne komprenis.

„Kaj nun ni tondos vin tiel senhara kiel rano,” diris la barbiro, dum li enpoŝigis la kvin cendojn kaj forte ekprenis la knabon.

„Venu Tomas,” li vokis al sia servisto, „helpu min iom.”

Art ektimis, kiam subite kvar fortaj manoj lin kaptis kaj sufiĉe maldelikate sidigis sur seĝon. Li kriis terure, tiel ke la edzino de la

barbiro alkuris el la ĉambro por vidi tion, kio okazas.

„Jan, Jan,” ŝi demandis maltrankvile, ĉar Art piedfrapis kaj manŝvingis kiel frenezulo, „kion vi faras al tiu knabo?”

„Mi venkos tiun obstinan azenon!” minace ridis la barbiro. „Ĉirkaŭmetu al li tukon, Tomas, kontraŭ la ŝprucado de la sango.”

La barbiro nur ŝercis, sed Art nun pli ege baraktis. Li kriis laŭte por helpo kaj preskaŭ piedbatis la stangojn el la seĝo.

„Se vi disbatas la aĵojn tie ĉi, mi fortranĉos al vi la nazon kaj la orelojn.” daŭrigis la barbiro, kiu estis vera turmentulo. „Nu Tomas, ligu la tukon malantaŭe al la seĝo. Jen bone! — Jetu tiun aĉan ĉapeton en la angulon. Brave! — Kaj nun tonda lin tiel senhara kiel holanda fromaĝo. Ne restu eĉ unu hareto! Uzu la plej grandan tondilon, kiun ni havas.”

Tomas trovis la aferon same komika kiel la mastro, kaj li faris sian eblon. Art iom post iom retransviligis, ĉar li komprenis, ke povus okazi al li pli teruraj aferoj. Grandaj flavaj harflokaj falis teren ĉirkaŭ li. Sed li demandis sin kun la plej granda miro, kial la barbiro tondas liajn harojn, kiam li venas nur aĉeti sapobrikon.

Tomas tondis la harojn tiel mallongaj, ke la kapo de Art vere fariĝis kiel fromaĝo, sed tamen ĝi mirinde plibeligis. Kiam fine ne plu io estis por fortondi, Tomas abunde superŝprucis la kapon per akvo kaj brosis ĝin tiel forte, ke Art timis perdi sian kapon.

„Jen sinjoro, vi estas preta!” mokis Tomas. „Ĉu estas tiel laŭ via plaĉo, aŭ ĉu vi preferas ankoraŭ pli mallonge? Vi nur ordonu!”

La tukon li malligis kaj Art ekstaris. Li kaptis sian ĉapon, kiu kuŝis en angulo de la ejo, surmetis ĝin, kaj demandis: „Ĉu mi nun ricevas mian sapobrikon, Halder?”

„Sapon! Vi ne venis por sapon! Via patrino sendis vin pro viaj longaj haroj, kaj la sapon estas nur elpenaĵo de ni. Nun forrapidu.”

La barbiro turnis la ŝlosilon kaj malfermis la pordon.

„Eliru! For!” li ordonis ridante. Sed Art restis.

„Ne, — mi volas la sapon,” li persistis, „Okke Tanma sendis min ĉi tien por sapon, kaj sen ĝi mi ne foriras.”

„Kion? — Kiu vin sendis?”

„Okke Tanma,” estis la respondo.

„Ĉu do vi ne estas Okke Tanma?”

„Ne, mia nomo estas Art Pluger kaj mi loĝas tuj apud li. Tie li ludas ĉe la turo.”

La barbiro kaj la servisto ekridegis. „Ha-ha-ha!” ridis la mastro „jen ni-ha-ha-ha-traktis ha-ha-ha-la malĝustan. Iru knabo, al via

patrino kaj alportu kvin cendojn por la tondado de viaj haroj! For vi! Ha-ha-ha-ha!”

Art forlasis la ejon. Estis agrabla sento je lia kapo. Li forprenis la ĉapon per la maldekstra mano kaj plaĉe glitigis la dekstran trans la senhara kapo. Kaj li ridis kontente: „Jen, tio estas bona! Nun mi estas tondita por nenio kaj mi kredas, ke restis eĉ ne unu hareto. Okke certe tre miros.” Li revenis ĉe la kamaradoj.

„Kie estas la sapon?” demandis Okke. „Estas bela historio” diris Art. „Tuj kiam mi venis en la frizejo kaj petis sapobrikon por sinjorino Tanma, la barbiro kaj la servisto prenis min kaj tondis min tiel glata kiel tiu rano. Kaj sapon ili ne volis doni al mi.”

Okke rigardis al Art kun granda miro.

„Jen, vidu,” diris Art, dum li demetis sian ĉapon kaj ree kontente frotis al si la stopletojn.

„Ĉu vi vidas?”

„Tio estas fiago de vi,” Okke eksplodis ..... „Vi tondigis la harojn anstataŭ aĉeti sapon. Sed redonu la monon, ĉu vi komprenas, tion mi ne lasas. Ĉu vi opinias, ke vi rajtas tondigi al vi la harojn por la mono de mia patrino?”

„Mi ne faris,” diris Art. „Via patrino interkonsentis kun Halder, ĉar vi ne volis iri al la barbiro, kaj nun li traktis min anstataŭ vin. Halder nur eraris.”

Okke ekridis. La historio ŝajnis ankaŭ al li ege komika. Kontente li rigardis la glatan kapon de Art.

„Prefere vi ol mi!” li diris ridante. „Sed Halder devas redoni al mi la kvin cendojn, ĉar mia patrino ne bezonas pagi por la hartondado de aliaj knaboj. Ho jen, tio estas tre komika.”

„Unue vi donu la tri globetojn al mi,” diris Art: „Mi meritis ilin honeste.”

„Kion? Meritis? Vi meritis nenion! Vi iris por sapobriko kaj anstataŭe vi revenas kun tonditaj haroj. Mi kore dankas vin!” diris Okke. Sed Art ne estis kontenta.

„Tio estas malnobla!” li kolere diris. „Estas ne mia kulpo, ke mi ne havas sapon.”

„Unue mi volas havi la kvin cendojn,” persistis Okke. „Atendu, mi mem iros al Halder por preni ilin. Tion mi ne toleras.”

Li prenis la globetojn, kiuj kuŝis ankoraŭ en la kaveto, kaj rekte iris al la frizejo, malfermis la pordon kaj eniris.

„Bonan tagon!” li diris. „Halder, mi venas por la kvin cendoj

de mia patrino. Ŝi ne diris al vi, ke vi tondu la harojn de Art Pluger, do ŝi ŝuldas nenion al vi.”

„Kiu vi estas, knabo?” demandis Halder.

„Okke Tanma. Mi venas por la kvin cendoj .....”

„Ho jes, — ho jes!” la barbiro interrompis, „vi pravas, knabo, via patrino ne pagos por aliaj knaboj.”

Sed dume li iris al la pordo, kaj ree ŝlosis ĝin per lerta movo. „Nu Tomas, tiu ĉi knabo tre pravas, kaj ni povas lin trakti laŭ sama maniero. Lia patrino havas rajton je tio.” Okke komprenis, ke li kuris en la kaptilon, kaj ridante li eksidis.

„Ĝi estas sufiĉe rigardinda!” li diris, sed sammomente li eltrovis,

„Ne necesas,” diris Okke. „Fortondu ĉion, Halder, tiam ili povas kreski longtempe.”

„Tion mi promesas,” ridis Tomas, kaj li tondis lin tiel glata, kiel nur eblis. Okke treege plibeliĝis; hazarde rigardante en la spegulo, kiu pendis antaŭ li, li preskaŭ ne rekonis sin. Li ŝajne estis tutalia knabo, kaj preskaŭ ne povis kredi, ke tiu estas Okke Tanma. Sed ankoraŭ ofte li ekridis, kiam li pripensis, kiel Art Pluger perdis siajn harojn.

Kiam li estis preta, li tuj iris hejmen por montri sin al la patrino kaj li rakontis al ŝi la okazaĵon detale.

Kaj lia patrino ankaŭ multe ridis. Ŝi karesis Okke sur la mal-longaj stopletoj kaj diris fiere: „Sed nun vi aspektas multe pli bone Okke. Estonte vi atendu ne tiel longe. Vi estas ne plu la sama.”

„Ankaŭ Art ne,” ridis Okke, „kaj kostis al li ne unu cendon.”

El „Okke Tannema” trad.: VANE.

## LA TREZORO.

Patro mortis. Antaŭ ol li forlasis la mondon, li diris al la tri filoj: „Amataj infanoj: Vi nur heredas nian kabanon kaj nian vinberĝardenon. Sed en ĉi lasta kuŝas granda trezoro. Fosu diligente, kaj certe vi trovos ĝin.”

Post la morto de la patro la filoj traserĉis kaj trafosis la tutan ĝardenon tre fervore. Sed ili trovis nek oron, nek arĝenton. Anstataŭ tio ili rikoltis tre grandan amason da fruktoj. Nun ili komprenis, kion opiniis la patro, kiam li rakontis al ili pri la trezoro. Kaj ili ĉiujare refosis tre bone la ĝardenon kaj rikoltis multan monon.

Aŭstrio.

J. Wiesböck.

## LA POSHORLOĜO.

Iam kelkaj Molsanoj promenis kaj trovis survoje poŝhorloĝon.

Ĉar la Molsanoj neniam dum siaj vivtagoj vidis poŝhorloĝon, ĉiuj scivole rigardis la strangan aĵon.

„Kio do ĝi estas?” ili demandis unu la alian.

La plej kuraĝa el ili klinis sin kaj levis la objekton.

„Ĝi estas sufiĉe rigardinda!” li diris, sed sammomente li eltrovis, ke estas en la horloĝo io, kio diras „tik-tak, tik-tak!”

„Ho”, li kriis timigite kaj forĵetis la horloĝon. „Ho, estas iu en ĝi! Mi estas certa, ke estas la diablo mem!”

Iom proksime sur la vojo kuŝis la horloĝo. La vitro estis frakasita, sed la meĥanismo ankoraŭ funkciis. La Molsanoj staris longtempe kaj observis ĝin. Sed subite ili kuraĝiĝis kaj iris al ĝi por vidi, kiel statas la horloĝo. La plej maljuna el ili nun klinis sin al ĝi.

„Li ankoraŭ estas!” flustris li timigite al la aliaj Molsanoj. „Mi aŭdas lin babili.”

Nun ĉiuj sidiĝis sur la vojo por preparoli, kiel plej bone aranĝi tiun ĉi aferon. „Ni prefere mortigu lin!” proponis unu el ili fine, kaj tiun konsilon ĉiuj tre ŝatis. Ili elektis la plej aĝan el ili por plenumi tiun taskon.

La Molsano prenis grandan ŝtonon kaj ŝteliris singarde al la horloĝo.

„Unu, du, tri,” li nombris tute mallaŭte, kaj „Bang!” jen li tute frakasis la miraklon per ŝtono. Farinte tion ĉi, li forprenis la ŝtonon kaj aŭskultis la horloĝon. Sed nun la meĥanismo estis detruita, kaj ne plu funkciis.

„Ĉu vi vidis, ke mi povis silentigi lin?” li diris fiere al la aliaj.

Ĉiuj Molsanoj rigardis lin admirante, kaj ili rapidis for kaj lasis la teruran monstron sur la vojo.

Odense, Danlando.

Dana popolfabelo, trad. de A. H. Petersen.

**Vendu „La Juna Vivo”, ponumere, tiam ĉiu en via**

**grupo povas legi la gazeton.**

## LA ENSORĈITA AKVO.

Estis varmega tago. La falĉistoj sur la kampo ofte haltis por forviŝi la ŝviton, kiu torente fluis sur iliaj vizaĝoj. Vane ili trinkis el la brand-botelo por iom hardi sin kontraŭ la varmego. Fine, kiam ankaŭ tio ne helpis, ili decidis eksidi ĉirkaŭ la akvostrio, kaj trempi la piedojn en la freŝa akvo.

Ili ankoraŭ foje trinkis de la brando, poste banis la piedojn, bruligis la pipojn kaj babilis.

Tiel ili sidis longan tempon, kiam onklo Kotúlka subite rigardis en la akvon kaj kun teruro ekvidis, ke lia piedo kurbiĝis kaj alkreskis al tiu de la najbaro. Eĉ pli, li vidis, ke ĉi tiu miraklo okazis ankaŭ al liaj kamaradoj: ĉies piedoj estis kvazaŭ rompitaĵoj kaj alkreskitaĵoj al tiuj de la najbaro (ĉar en la akvo la piedoj speguliĝis kurbe). Li ekmalĝojis, eĉ timis kaj plorante li diris: „Nu, ni ripozis, ja ripozis. Ni eĉ pli ol sufiĉe refreŝiĝis — sed kio okazis al niaj piedoj?”

Ili ĉiuj fikse rigardis en la akvon kaj vidis, ke eĉ neniu orde havas la piedojn. Ankaŭ la aliaj ekmalĝojis kaj timis. Kvankam ili sufiĉe plifortigis sin per ebriiga trinkaĵo, kio, laŭdire, estas tre bona eĉ kontraŭ la timo, neniel ĝi helpis nun kaj vera timo regis ilin. Ĉar io simila kutime ne okazas, la akvo devis esti ensorĉita!

„Ho, stranga afero!” ĝemis Jakob, „kiel ni nun venos hejme?”

„Ho, tio estas nenio,” ekparolis la plej juna el la falĉistoj, Joĉjo, kiu sidis iom malproksime de ili kaj ne trinkis brandon. „Miaj piedoj ial ne estas ensorĉitaĵoj. Se vi deziras, mi helpos vin. Mi frapagos la akvon per falĉiltenilo, kaj al ĉiu apartenos la piedoj, kiujn li elakvigos.”

La turmentitaj falĉistoj volonte akceptis la proponon.

Joĉjo, la petolulo, forte frapegis la akvon per la falĉiltenilo — kaj jen kia miraklo! Ĉiuj eksaltis kvazaŭ brulvunditaĵoj kaj ĉiu havis ree nur du piedojn kiel antaŭe!

Nun ili ĝemis pro ĝojo kaj ekfalĉis. Ili eĉ ne atentis plu la varmegon.

Ĉeĥoslovakujo.

J. V. Dolinsky.

Mi ĝentile petas pagi la abonon por „La Juna Vivo” antaŭ 15 Jan. Post tiu dato ni prezentos kvitancon.

## SOLVOJ EL NO. 10-11.

1. Patro
2. Abio
3. Tia
4. Ro
5. O

	1	2	3	4	5
1	p	a	t	r	o
2	a	b	i	o	
3	t	i	a		
4	r	o			
5	o				

1. Abelo
2. Olivo

	1	2			
	a	o			
1	a	b	e	l	o
	e		i		
2	o	l	i	v	o
	o		o		

1	2	3	4
5	6		
7	8	9	10
11	12	13	14
15			
	16		

Horizontale:

2. Estas birdo, kiu ne prizorgas siajn idojn.
5. Sufikso, kiu certe ne pli-grandigas.
7. Prefikso, uzata kiam vi jam faris la agon.
8. Necese por edziĝo.
11. Verba sufikso.
12. Tuto de la bonaj kaj malbonaj kutimoj.
15. Vi kaj mi.
16. Kelkfoje faras ŝipoj.

Mehelen. Belgujo.

Vertikale:

1. Tie loĝas la homaro. (rad.)
3. Produktaĵo de la kokino
4. Kune.
6. Delogi.
9. Eluzas la aĵojn.
10. La emo esti pia.
11. Virina sekso.
13. Denove.
14. La malo de ne.

Rainson.

## LA ĈARLATANO.

Franca ĉarlatano staris ĉiutage sur iu placo en Parizo.

Li ĉiam komencis diri al la homoj: „Gesinjoroj: La dentisto elŝiras al vi la dentojn, sed mi ne, mi rikoltas ilin, kiel oni rikoltas florojn!”

## ABRAHAM LINKOLN.

Ĉu vi iam aŭdis pri Abraham Linkoln, la konata prezidanto de Usono? Kiam li estis ankoraŭ juna juristo, li ofte devis ĉeesti kun-sidojn, malproksime de sia hejmo. Ĉiam li iris ĉevale kaj liaj kunuloj akompanis lin. Iun vesperon, kiam ree ĉiuj rajdis hejmen, ili vidis survoje du etajn hirundojn. „Certe ili falis el la nesto”, ili diris. Ĉiuj kompatis la birdetojn, sed daŭrigis la vojaĝon. Nur Abraham deĉevaliĝis por ekzameni la falintajn bestetojn. Feliĉe ili ne estis vunditaj kaj tuj Abraham serĉis la neston de la hirundoj.

„Kion vi faras?” demandis la aliaj.

„Mi serĉas la neston,” Abraham respondis.

„Venu, ne haltu! Estas jam malfrue!” oni kriis al li.

Tamen Linkoln, la alta junulo kun la grandaj manoj, daŭrigis sian diligentan serĉadon sub la tegmentoj de la apudaj kabanjoj. Fine li trovis ĝin, kaj metis zorgeme la birdojn en ilian neston.

Li revenis du horojn post la aliaj. Ili jam vespermanĝis, kaj mokridis pri li. Tamen Abraham simple respondis: „Mi ĉi tiun nokton ne dormus dum unu momento, se mi ne estus alportinta la bestetojn en ilian neston.”

La granda Linkoln dormis tiun nokton kiel urso.

Amsterdamo. Nederlando.

C. v. T.

## „KAPTITA.”

En Danujo la lernej-infanoj ofte ludas ludon, kiun oni nomas „kaptita”. Multaj povas partopreni ĝin. Ĉe la du finoj de la ludejo estas liberaj lokoj. Inter ĉi tiuj estas granda spaco kaj tie staras iu por kapti la aliajn, kiuj kuras tien kaj reen al la liberaj lokoj. Kiam li aŭ ŝi tuŝas iun kaj samtempe diras „kaptita”, ili duope daŭrigas la kaptadon. Baldaŭ ili tuŝas aliajn, kaj ankaŭ tiuj helpas kapti. La tuta aro finfine estas kaptita kaj oni komencas denove.

Okazas, ke la kaptantoj ne povas kapti la aliajn, ĉar ili restas en la paclokoj. Tiam ili komencas nombri: 1, 2, ..... 10. Post dek la kaptantoj rajtas kapti la aliajn en la liberaj lokoj. Tiam la ludo komenciĝas denove; la unua kaptito fariĝas kaptanto.

..... Ĉu ankaŭ en aliaj landoj la lernejinfanoj ludas tiel? Al ĉiu infano, kiu respondas al mi, mi sendos belan dankkarton.

Adreso: H. Nederland.

T. Kalundborg. Danlando.



MIGRO KANTO

LA TEMPO NUN AL VEN. OS SUR LIGU SELON AL ĈEVAĤ HO. DI. AŬ MI EK.

RAJDOŜ TRA KAMPOKAJLA VAL' FI DI RU LA RULARU LA LA LALAFI DI

RU LA RU LA RU LA LA HO. DI. AŬ MI EK-RAJDOŜ TRA KAMPOKAJLA VAL'

- |  |   |
|--|---|
| <p>2. En patra la ĝardeno<br/>Kreskadas bela flor', ja flor',<br/>Tri jarojn da atendo<br/>Ho temp', rapidu for.<br/>Fi di rula k.t.p.</p> | <p>3. La reĝo estas stulta<br/>Batali por patri', patri';<br/>Mi sentas min feliĉa<br/>En la batal' por ŝi.<br/>Fi di rula k.t.p.</p> |
| <p>4. Vi pensas esti bela<br/>El tuta juna knabinar'<br/>Kaj ankaŭ plej agrabla<br/>Ho kia granderar'.<br/>Fi di rula k.t.p.</p>           | <p>5. Dum la surtera vivo<br/>Vi estu mia amikin'<br/>Kaj kaptos min la morto,<br/>Vi entombigos min!<br/>Fi di rula k.t.p.</p>       |

Tradukis: Wupertalano.

Germanlando.

**SINGARDEMA HOMO.**

Fremdulo loĝis dumnokte en malgranda hotelo.

Antaŭ ol li enlitiĝis, li prenis du pantoflojn kaj ŝovis ilin sur la piedojn.

En la sama ĉambro estis alia persono, kiu jam kuŝis en la lito. Ĉi tiu homo kun miro observis la strangajn preparojn de sia ĉambrokunulo. Fine li demandis: „Mia bona amiko, kial vi faras tion?”

Kaj nia strangulo respondis: „Mi estas singardema. Iam mi sonĝis, ke mi piediras sur najloj kaj vitreoj. Kaj mi sentis dum la dormo pro tio multajn dolorojn. Mi volas eviti, ke tio ankoraŭfoje povu okazi. Tial mi ŝirmas miajn piedojn.

Aŭstrio.

Laŭ la Germana trad. J. Wiesböck.

## VERKAĴO LAŬ LA BILDOJ EN „LA JUNA VIVO” No. 2.

S. ro N. estis en la proksima urbeto kaj hejmen veturonte li aĉetis por siaj familianoj kolbasetojn. Li antaŭsentis jam la plezuron, kiun li faros al la familianoj kaj ĝoje surbicikligis kaj ekveturis.

Sed la diablo ne dormas. Survoje venis renkonte al li alia biciklanto, kiu, same kiel li, ankaŭ portis korbeton. En ĝi estis fumigita viando. Pli kaj pli ili alproksimiĝis. La vojo estis hazarde ĉe tiu loko mallarĝa kaj malbona. Ĉiu opiniis, ke la alia flankeniros. La afero graviĝis. Subite ekkrako kaj la bicikloj interplektiĝis. La korbetojflugis flanken kaj el unu la kolbasetoj logante elrigardis. „Stultulo!” kriis N., „Ĉu vi ne povas veturi?” „Mi jes, sed ne vi!” respondis la alia.

„Prenu infanveturilon, ke vi ne havu akcidenton!” „Vangofrapon vi ricevos!” k.t.p. oni aŭdis dum la disputo. Post kelkaj sekundoj la plej bela batalo estis preta. Oni vidis jam homojn stari ĉirkaŭ la batalantoj, kvazaŭ ili estus kreskintaj el la tero. En tia okazo la homaj ecoj estas certe mallaŭdindaj. Ili instigis eĉ la batalantojn per la vortoj: „Batu lin! Forte, forte! Ne cedu!” k.t.p. Gendarmo venis, notis la aferon kaj promesis punon. Dum la batalantoj rulis sin sur la tero, venis de flanko du hundoj. Ili ne estis allogitaj de la batalo kiel la homoj, sed ili flaris la bonan odoron, kiu eliĝis el la du korbetoj. Kiam ili iomete pli precize rigardis la enhavon, ne plu estis dubeble, ke ili havos nun festotagon. Rapide buŝkaptante la bongustaĵojn ili forkuris. „Strange”, ili pensis, „ke neniu malhelpis nian rabon.” Kaj pro tio ili duoble ĝojis. Des pli malgranda estis la ĝojo de la biciklantoj, kiam ili ekvidis la malplenaĵojn korbetojn.

Ĉu ili rememoros venontfoje? Se du disputas, ĝojas la tria!

Zwettl, Nö, Aŭstrujo.

Esperanto grupo Zwettl.

## LA DEKA LECIONO.

### A

#### 1. Mia ĉambro.

2. En **mia** ĉambro estas kvar muroj. 3. Sur la muroj pendas bildoj kaj portretoj. 4. En la **mezo** de la ĉambro staras tablo. 5. Ĉirkaŭ la tablo staras la seĝoj. 6. Sur la tablo estas **pleto** kun ses tasoj kun subtasoj, laktujo kun lakto, sukerujo kun sukero, teujo kun teo. 7. Sur la **kameno** estas vazoj kaj libroj. 8. Antaŭ la fenestroj pendas kurtenoj. 9. Sur la fenestra breto staras florpotoj.

**B.**

La filino **sapas**. La filino **sapas** la plankon.

La patrino **flikas**. La patrino **flikas** la pantalonon.

**LA PURIGO.**

1. La patrino **bala-as** la plankon.
2. La filino **sapas** la plafonon.
3. Ili **frotas** la meblojn.
4. La patro kaj la patrino **frapas** la tapiŝon.
5. La lavistino lavas la kurtenojn.
6. La knabino **flikas** la kurtenojn.
7. La patro **pendigas** la spegulon.
8. La spegulo falas en **pecoj**.
9. La patrino **insultas**.
10. Li kuras for al la **ĝardeno**.

**C.****LA VILAĜO.**

1. Mi amas la vivon en malgranda vilaĝo.
2. Mi malamas la **bruon** en la **urbo**.
3. La infanoj **ludas** sur la mallargaj stratoj.
4. La domoj estas malaltaj.
5. La turo estas alta.
6. Estas ankaŭ **dikaj** arboj kaj maldikaj **lanternoj**.
7. Sur la vojo veturas **aŭtomobilo**, **aŭtobuso**, kaj veturilo.
8. Ni **vidas** ĉevalon antaŭ la **butiko**.
9. En la herbejo estas bovinoj, **ŝafoj**, kaj ankaŭ du porkoj.
10. Sur la **kanalo** veturas **ŝipoj**.

- I. Lernu parkere la novajn vortojn en A, B, C.
- II. Traduku A, B, C en vian gepatran lingvon.
- III. Post kelkaj tagoj traduku A, B, C **el** via gepatra lingvo en Esperanton.
- IV. Respondu al la demandoj:


A. Kio estas en via ĉambro? Kio pendas sur la muroj? Kie staras la seĝoj? Kio estas sur la tablo? Kie estas vazoj kaj libroj? Kie pendas la kurtenoj? Kio staras sur la fenestra breto?

B. Kion **bala-as** la patrino? Kion **sapas** la filino? Kiu **frotas** la meblojn? Kiu **frapas** la tapiŝon? Kiu lavas la kurtenojn? Kion **flikas** la knabino? Kiu **pendigas** la spegulon? Kiu **insultas**? Kial patrino **insultas**? Ĉu la patro restas en la ĉambro?

C. Kion mi amas? Kion mi malamas? Kie ludas la infanoj? Kiaj estas la domoj? Kia estas la turo? Kiaj estas la arboj kaj lanternoj? Kio veturas sur la vojo? Kie estas la ĉevalo? Kie estas la bovinoj? Kio estas sur la kanalo?

**Persistu ĝis la fino!**

## LA DEKUNUA LECIONO.



Wat een diepe zakken!

**KIAJ PROFUNDAJ POŝOJ!**

El: „Lighthart en Scheepstra, Dicht bij Huis”, J. B. Wolters, Groningen—Den Haag—Batavia.

Mi manĝas panon. Mi manĝas tion. Li skribas leteron. Li skribas tion. Kion mi manĝas? Mi manĝas panon. Kion li skribas? Li skribas leteron. Mi manĝas bonan panon. Li skribas longan leteron.

Por la bona uzo de la finaĵo-n, mi konsilas: Ripetu multfoje la ludon: „Mi vidas ion, kion vi ne vidas” (La Juna Vivo No. 2, paĝ.21). Kompreneble oni povas ludi ĝin diversmaniere: mi vidas objekton, kiun vi ne vidas, ĝi estas ruĝa, granda, malgranda, ovala, ligna, metala, kvarangula, ronda, dika, maldika, longforma, k.t.p.

### KOSTUMO KUN PROFUNDAJ POŝOJ.

La tajloro venis kun nova kostumo. Petro tre ĝojis.

„Ĉu mi jam povas surmeti la kostumon?” li petis.

La patrino konsentis.

Petro rigardis en la spigulo. Li vidis, kiel bela ĝi estas.

„La patrino ne pagis la kostumon,” diris la frateto. Mi povas palpi tion. Li pinĉis Petron en brako. Mino ankaŭ faris tion. Ŝi pinĉis Petron en la alia brako. „Mi ankaŭ povas palpi tion,” ŝi diris. „Nia patrino ne pagis la kostumon.”

Petro ridis kaj ridis. Li estis fiera pri la bela kostumo.

„Marŝu tra la ĉambro,” diris la patrino.

Petro faris tion.

„Rigardu al tiu knabo! Li paŝas kiel pavo!”

La patro envenis.

„Patro, patro! Mi havas novan kostumon.”

„Mi vidas,” diris la patro. ”He, ĝi estas belega!”

„Palpu, patro, kiel profundaj poŝoj!”

„Hehe, kiel profunda! Estas multe da spaco!”

Kio estis tio? „Cendo! Estas cendo en mia poŝo!” kriis Petro.

„Vi faris, patro! Mi dankas!”

La patro ridis. „Domaĝe, ke jam alia portis la kostumon,” incitis la patro. „Mi ne komprenas, kial vi estas tiel fiera.”

„Tio ne estas vera. Nun vi mensogetis. Mi mem kun nia patrino aĉetis ĝin.”

„Li estas prava,” diris la patrino.

„Tamen estas alia, kiu jam portis ĝin,” ripetis la patro.

Heĉjo kaj Mino ridis, sed ili ne bone komprenis, kion la patro diris. La lipo de Petro tremis. Larmoj aperis en liaj okuloj.

La patrino **flustris** ion al li. **Tiam** ..... ankaŭ Petro ridis.  
„Vi **celas** la **ŝafon!** Nun mi ankaŭ komprenas la patron!”

- a. Lerne bone la novajn vortojn.
- b. Traduku la rakonteton en vian gepatran lingvon.
- c. Legu multfoje la lecionon kaj respondu al jenaj demandoj:

Kun kio venis la tajloro? Ĉu Petro ĝojis? Kion li petis? Ĉu la patrino konsentis? En kio rigardis Petro? Kion li vidis? Kion diris Heĉjo? Kion li faris? Ĉu Mino ankaŭ faris tion? Kion diris Mino? Ĉu Petro malĝojis? Ĉu li ĝojis pri la bela kostumo? Kion diris la patrino? Ĉu la patrino ankaŭ estis fiera? Kion Petro vokis al la patro? Kion li respondis? Kion faris la patro? Ĉu la patro incitis Petron? Kion li diris? Ĉu Petro konsentis? Ĉu la patrino helpis la filon?

Tre bona — bonega	tre bela — belega
Tre granda — grandega	tre longa — longega
Tre granda arbo — arbego	tre granda bastono — bastonego.

### MAJFLORETO.

Kiam la bona Alah estis kreinta la florojn, li demandis ĉiun el ili: „Mia floreto, kie vi volas loĝi?” Iu volis loĝi sur monto, alia en valo; iu ĉe rivero, alia sur herbejo. Sed neniu volis vivi en arbaro. Kial ili ne volis tion? Kial ili timis vivi en arbaro? Ili pensis: „Tie la varma suno ne povas radii sur nin; tie ni devas sidi ĉiam en ombro.” Kaj tial la arbaro estis tre malgaja.

Nun venis Majo. Sur herbejoj floris kaj odoris floroj. Abeloj zumis ĉirkaŭ burĝonfloroj, kaj multkoloraj papilioj flirtis ĉie. Tion vidis la arbaro kaj ĝi diris al si mem: „Mi bedaŭrinda arbaro, mi devas resti ĉiam sola. Kiu venas al mi, se neniuj floroj floras sub miaj arboj?”

Ĝi esploris, kaj la larmoj falis sur florojn, kiuj kreskis ĉe rando de la arbaro. Iu larmo falis sur majfloreton. La afabla floro kompatis la malfeliĉan arbaron kaj ĝi diris al siaj kunuloj: „Ĉu ni iru en la arbaron?” Kaj tuj ĝi tiris el la tero la piedetojn kaj migris en la arbaron. Kiam anemoneto kaj primoleto vidis tion, ili diris: „Ankaŭ ni kuniru.”

De tiam loĝas tiuj floretoj en arbaro.

Arvika. Svedujo.

Egulo.

## FRATECO.

Ĉiuj homoj devas formi unu grandan familion. Ha, kiom pli feliĉaj ili estus, se ili kapablus sin ami kaj interhelpi kiel fratoj!

Kiam arbo staras sola, la ventoj batas ĝin kaj forrabas la foliojn. — Kiam kreskaĵo staras sola, ne trovante ŝirmon kontraŭ la suna ardo, ĝi velkas kaj mortas.

Do ne estu kiel la kreskaĵo kaj arbo, kiuj estas solaj, sed unuigu vin, subtenu kaj ŝirmu vin reciproke!

Kiu estas pli malforta ol pasero, pli senarma ol hirundo? Tamen kiam rabobirdo aperas, la hirundoj kaj paseroj sukcesas forpeli ĝin, kolektante sin ĉirkaŭ ĝi kaj postflugante ĝin ĉiuj kune.

Sekvu la ekzemplon de la pasero kaj de la hirundo! Tiu, kiu disiĝas de siaj fratoj, la timo sekvas lin! Kiam vi renkontas lin, sidiĝu apud li. Kiam li ripozas, ne forlasu lin eĉ dum lia dormo.

Do se oni demandas vin: „Kiom vi estas?“, respondu: „Ni estas unu, ĉar niaj fratoj estas ni, kaj ni estas niaj fratoj!”

Nanterre, Francujo.

El Laménais (Paroloj de kredanto)

R.M.

Laboru pace por la paco

Ni semas kaj semas konstante

Labori kaj pensi kaj lerni estas vivi.

---

 KORESPONDADO.

*B. Soissons, Franclando:* La stilo de via verkaĵo estas tro malfacila. Ankaŭ la enhavo ne estas konvena. De viaj tri enigmoj ni enpresigos du.

*Ŝ. Nikolajev, Sovetio:* Via artikolo ne sufiĉas.

La enigmo estas tro implika.

*D. Turĉiansky, Ĉeĥoslovakio:* „Koĉurkovo” ne taŭgas por la revuo.

La bildo pri la bovino estas tro kruela. „La ensorĉita akvo” estas taŭga.

*I. K. Baljuvica, Bulgarlando:* Via rakonto estas tro simpla.

*B. Stompetoren, Nederlando.* Vi forgesas, ke „La Juna Vivo” estas tute neŭtrala.

Multaj petis al mi resendi la neenmetitan kopion. Mi nur povas fari tion, se oni enmetas sufiĉe da respondkuponoj.

Mi promesas estonte pli frue respondi al la leteroj.

**REKLAMTARIFO:**

I paĝo: 20 gld.; ½ paĝo: 11 gld.; ¼ paĝo: 6 gld.; ⅛ paĝo: 3,5 gld.;  
 1/16 paĝo: 2 gld.

**KORESPOND-ADRESOJ:**

ĉiu vorto: 0.03 gld.

Organo de jugoslava esperanto-movado

**„LA SUDA STELO”**

aperas ĉiumonate en Sl. Brod.

Jarabono: 1½ us. dolaro aŭ 5 svfr.

Specimenon kontraŭ poŝta respondokupono tuj sendas Redakcio de „La Suda Stelo”, Slavonski Brod, Jugoslavio.

Lernantoj el 7a klaso, inter kiuj multaj junpioniroj, dez. kor. pr. ĉ. t. precipe pri lerneja laboro kaj socia, ripoztempo kaj ĝia uzo.

Adreso: U.S.S.R. Uzbeka resp., **Kokand**, ul. Libknechta, lernejo No. 24. Por Esperantrondeto.



**„FLORETOJ”**

Porinfanaj Rakontoj tradukitaj de la

**„VENDREDA KLUBO”**  
 en Winschoten  
 (Nederlando)

Kun multaj koloraj kaj nigraj

bildoj

de C. Jetses

prezo ..... 0.70 ned. guld.

Aĉetebla en ĉiu librejo kaj ĉe la eldonisto:

**J. B. WOLTERS**

**Groningen — Den Haag  
 Batavia.**

Aŭstrujo .....	3.20 ŝil.
Britujo .....	3 ŝil.
Belgujo .....	15 fr.
Ĉeĥoslovakujo .....	16½ Ĉ. kr.
Danujo .....	3 kr.
Franĉujo .....	10 fr.
Svislando .....	2. 10 fr.
U.S.A. ....	0.70 dol.
Bulgarujo .....	58 lev.

Germanujo .....	1.75 M.
Hispanujo .....	5 pes.
Hungarujo .....	3.30 p.
Latvujo .....	2. l.
Norvegujo .....	2.7 kr.
Polujo .....	3.6 zl.
Rumanujo .....	72 l.
Svedujo .....	2.70 kr.

Bonvolu sendi la monon por „La Juna Vivo”:

*Anglujo:* The British Esp. Association, Inc. 142 High Holborn, London, W.C.I.

*Belgujo:* Hendrik Rainson, Mechelen, Belga ĝironumero 335183.

*Bulgarujo:* Ivan Krestanov, str. 6 Septemvri, Sofia.

*Danujo:* S.rino M. Jensen, Galtrup. Erslev.

*Franĉujo:* S.ro Matthieu, Dijon, 27 Place de la République, Côte d’Or.  
 ĝironomero: Cheque postal No. 12025. Dijon. (Côte d’Or).

*Germanujo:* Ewald Killmer, Schwabenweg 14, Wuppertal-Elberfeld. Germana ĝironumero: „Köln 104097”.

*Hispanujo:* S.ro Montserrat, str. Provenza, 75, 2°, 3°, Barcelona.

*Svedujo:* John Karlsson, Hylinge Norrköping. Sveda ĝironumero: 72295.

*Japanujo:* Ishiguro, Daita 1—784, Setagaya, Tokio.

*Ĉinujo:* S-ro Can, 15 Shang Sieh Chia, Peiping.